

# Neniu estu forgesita...



Vladimir LEMELEV, Rusio

Ĉiun trian dimanĉon de majo okazas la Tutmonda Memortago pri Mortintoj pro Aidoso – nuntempe ilia nombro proksimiĝas al 30 milionoj, kaj ĉiujare tiu ĉi nombro pligrandiĝas je pliaj tri milionoj. La 15-an de majo ĉi-jare la Memortago estis aranĝita en Moskvo. Same kiel pasintjare, al la placo alvenis multaj, precipe junaj, homoj; ĉeestis ankaŭ pluraj raportistoj. Multaj ĉeestantoj portis sur siaj vestaĵoj la simbolajn ruĝajn **rubandetojn** kaj tenis en la manoj **kandelojn**. Denove estis multaj paroladoj de la organizantoj, **pastro**, HIV\*-**infektito**, studentoj, reprezentanto de la Monda Organizaĵo pri Sano... Oni parolis, ke hodiaŭ aidoso ne plu estas malsano de nur **margenuloj** – ni ĉiuj estas endanĝerigitaj. La registaro de Rusio devas pli atenti tiun seriozan problemon, ĉar nuntempe en Rusio la nombro de HIV-infektitoj, nur laŭ oficialaj informoj, estas pli ol 300 mil, sed reale certe superas unu milionon. Necesas urĝa kuracista helpo al ĉiuj infektitoj, plejmulto de kiuj ne povas aĉeti la modernajn kuracilojn.

Malsame de la pasinta jaro, ĉi-jare al ĉeestantoj estis prezentitaj fragmentoj de la ekspozicio Tutmonda Peplomo, kies plena ekspozicio okazis en la ĉefa moskva ekspoziciejo en aprilo. La unua ekspozicio de memorigaj **toloj** okazis en 1987 en Vaŝingtono (Usono) – tiam estis ekspoziciita grandega ŝtofaĵo, kudrita el multaj miloj da memorigaj toloj, ĉiu el kiuj estis dediĉita al mortinto pro aidoso (peplomo estas, laŭvorte, lit-kovrilo farita el pecoj de ŝtofo). La unua vojaĝanta ekspozicio de la Tutmonda Peplomo okazis en Bangkoko

(Tajlando), somere 2004, dum la 15-a Internacia **Konferenco** pri HIV/Aidoso, kaj nuntempe la ekspozicioj de la Peplomo okazas en multaj landoj.

La memorigajn tolojn kudradas parencoj, amikoj de mortintoj kaj simple kompatemaj homoj, por ke la memoroj pri mortintoj de aidoso neniam malaperu. Sur la kolor-riĉaj memorigaj toloj oni povas legi la nomojn, aĝojn, profesiojn de la mortintoj. Multaj toloj enhavas poemojn, desegnaĵojn, kortuŝajn leterojn, dediĉitajn al la amataj personoj, mortintaj pro aidoso. Oni ne povas senpartie preterpasi la memorigajn tolojn de la ekspozicio; multaj vizitantoj ploris... Simplaj kaj elkoraj vortoj sur la memorigaj toloj – “al amata patrino”, “ni memoras vin”, “ĉiam kredi je boneco kaj ami, Nina” ktp. – naskas en la koroj ne nur la sentojn de doloro, sed ankaŭ la kredon je bonkoreco, homfrateco, unueco... La konataj vortoj – “Neniu estas forgesita” ekhavis tie por multaj ian personan sencon.

La Tutmonda Peplomo en Moskvo konsistis el 20 partoj memore al mortintoj pro aidoso en Afriko, Azio, Ameriko, Aŭstralio kaj Orienta Eŭropo (kvar partoj estis por la mortintoj pro aidoso en Rusio). Antaŭ la malfermo de la ekspozicio, la organizantoj kaj ĵurnalistoj paroladis pri ĝiaj celoj – edukado pri toleremo en la socio, kontraŭagoj al **diskriminacio** rilate HIV-infektitojn, neceso de unuigo de la homaro en la batalo kontraŭ aidoso...

La ekspozicio estis bone organizita – konstante ĉeestis studentoj kaj gelernantoj, kiuj rakontis al vizitantoj pri la ekspozicio, bonkore respondis demandojn, helpis... Estus bone, ke pli multe da homoj, precipe

gejunuloj, vizitu la similajn ekspoziciojn, kiuj estas vere bona rimedo kontraŭ diskriminacio kaj **indiferenteco**!

La ekspozicion organizis la Rusia Amas-Komunikila Partnereco en la Batalo Kontraŭ HIV/Aidoso kaj la rusia movado “Imena” (“Nomoj”), dank al subteno de Transatlantikaj Partneroj Kontraŭ Aidoso kaj de aliaj organizaĵoj kaj privataj personoj.

\* HIV – homa imunonesufiĉestiga viruso – **viruso**, kiu kaŭzas aidoson

**diskriminacio** – sub-premo de iu

grupo fare de alia **indiferenteco** – monro de neniu intereso

**infekto** – eniro de viruso en la korpon

**kandelo** – (kutime) longa aĵo, kiu povas bruli dum sufiĉe longa tempo por lumi

**konferenco** – renkontiĝo de fakuloj (sciencistoj)

**margenuloj** – homoj, puŝitaj al la rando de la socio (ekz: malriĉuloj ktp.)

**pastro** – estro en preĝejo

**rubando** – longa kaj mallarĝa peceto de ŝtofo

**tolo** – peco de ŝtofo

**viruso** – tre eta vivulo, kiu kaŭzas malsanojn

